.

& Por D. K.:

< Rekante 15 el 29 batoj por strofo, entute 203 paŝoj dum 3 minutoj. Verkis Mikaelo Bronŝtein (1968). Baladigis Martin Strid (2015) per melodio kaj rekantaĵo de & Davida balado.>

(#Melodio:

<:29> (o;mi /miimimi miirere reedodo doodo;do doododo dore mi;mi miimimi miimire miimire miimi;mi soso faamimi mi;

(#Rekantaĵe: redo re rere mire do rere re; rere mire doTi LaSo So LaTi do))×7)+

(&Strofoj:

'1 Por /ĉiam vi restis en mia memoro; ridantaj, kaj sen avid' ; mi sendas al vi kondolencon tutkoran. ; Jen versoj – ankaŭ por vi.

(×: **Bruas danco en halo, dancu en ĉen'! ; Ĝojaj paŝas ni en esperanto-kunven'**.)

'2 Delonge forpasis inundoj, militoj, ; nek krioj, nek pafoj turmen[tas vin]. ; Vin ĉiam atendas ĉemiz' amelita, ; taseto kun kafo, fide[la e]dzin', ...

'3 en kies okuloj, bovide kvietaj, ; glacias senkulpa mir'. ; ĵaluze sed dolĉe ŝi ĉiam ripetas: ; – Aŭ esperanto, aŭ mi! .....

'4 Jen tiel vi vivas en ora feliĉo ; kun dolĉa matena gap', ; kaj poste aperas pepanta filino, ; kaj vindoj, kaj patra gaj'... .....

'5 Sed foje dolori komencas cikatroj ; en via feliĉa anim' ; Kaj en rememoroj – nur vojoj, nur kantoj, ; nur blua ĉielo sen lim'. .....

'6 Reeĥos en revoj tendaroj turistaj, ; fajrejoj kaj nokta vals', ; kaj ies okuloj, okuloj turkisaj ; sen pigra altruda fals'. .....

'7 Kaj gratas la koron ekzisto senĝoja, ; maĉata kun abomen', ; ĉar nure en sonĝo vi revas pri l' vojo, ; kiun elektas mem. .....)